Protokolo de la estrara interkonsiliĝo de Norvega Esperantista Ligo merkredon la 23-an de aprilo 2026 per Zoom

**Ĉeestis** Bård Hekland, Jardar E. Abrahamsen, Lars Sandbakk, Claude Rouget, Harald Rygg (parte) kaj Marianne Lund.

**1. Aprobo de la tagordo**

La tagordo aprobiĝis.

**2. Trarigardo de la protokolo de la pasinta estrara kunveno la 4-an de marto 2026**

La protokolo de la pasinta estrara kunsido aprobiĝis. Komentoj pri la traktitaj punktoj:

- Jardar telefonos al la Nacia Biblioteko.

**3. Jarraporto 2025**

Claude ĝisdatigis la mankantajn informojn en la jarraporto. Nun ĝi pretas.

**4. Landa kunveno**

La kunveno estas anoncita en EsperantoNytt 2/26 kaj en Norvega Esperantisto. Krome ni enmetos informon pri ĝi en la retejon «Eventa Servo».

La tagordo similu al la pasintjara. La estraro ne ricevis proponojn al la tagordo de membroj. La estraro proponos, ke la kotizo restu senŝanĝa dum unu plia jaro. Bård informis la elektan komisionon, ke la nunaj estraranoj pretas resti estraranoj dum nova periodo. La estraro proponos validigi la ekzistantan laborplanon dum nova periodo.

Post la oficiala parto de la kunveno Vidar Benjamin Skretting, esploristo pri islamismo en Sahelo (sude de Saharo), prelegos (ĉ. 19.30) pri la historio kaj nuna situacio de la regiono.

**5. Nordia kunlaboro**

Okazas retkunvenoj, ankaŭ kun finnlanda partopreno, dum kiuj oni diskutas diversajn formojn de kunlaboro. Anticipe anoncita temo (tagordo) povus altiri pliajn partoprenantojn.

**6. Riparlaboroj en Esperantonia**

Laŭ skriba interkonsento kun fenestroriparisto, la riparoj de la fenestroj estos faritaj en junio. Prezo: ĉ. 20.000 kronoj.

**7. Libroj de Knut Haugen**

La Esperanto-libroj, donacitaj de Knut Haugen, alvenis poŝte al Esperantonia. NEL repagis al Knut Haugen la sendokostojn.

**8. Eventualaĵoj**

* NEL ricevis ĝis 35.000 kr. de legaco Uhlen.
* Bergenano kontaktis Bård pro trovitaj materialoj pri la bergena Esperanto-movado en privata bergena hejmo. Bård trarigardos la materialojn kaj decidos, kiuj el ili estas konservindaj.
* Marianne rakontis pri vizito al Douglas.
* Lars rakontis pri vizito de Bård al Rogaland, kaj pri komuna vizito de kelkaj esperantistoj al Cecile Anda.

**9. Venonta estrara interkonsiliĝo**

La venonta estrara interkonsiliĝo okazos la 11-an de junio je 20.30.

Protokolis Marianne Lund